


**Necesa kaj rekomendinda persona ekipaĵo:** malpeza tendo, dormosako, aermatraco, ŝargilo por baterioj, poŝtelefono, bateria lampo, fotilo, persona identigilo (por eksterlandano: pasporto), sanasekura identigilo, kontraŭsunaj ŝmiraĵoj, ĉapo aŭ ĉapelo por kapoprotekto, faldebla sunombrelo, kontraŭkula protektilo, rezervaj vestoj (prefere someraj: T-ĉemizoj, kalsonoj, ŝtrumpoj, mallongaj pantalonoj), plasta pluvmantelo, malpezaj someraj ŝuoj, sportŝuoj, manĝilaro (kulero, forko, tranĉilo, telero aŭ bivaka manĝujo), bankostumo, viŝtukoj, sapo, ŝampuo, dentobroso kaj dentopasto, tualetpapero, skribiloj, notlibro, adresaro, aliaĵoj (naĝiloj kaj plonĝmaskoj, fiŝista bastono kaj hokoj, kontraŭsunaj okulvitroj, ludkartoj, faldebla mato, pilko, muzikinstrumentoj, medikamentoj ktp.)

## TRANSPORTEBLECOJ

**ZAGREB - KARLOVAC**

Aŭtobuso: 7h00; 8h00; 9h30; 14h30; 15h30
Trajno: 12h45; 14h41; 15h38; 16h28; 17h20

**ZAGREB - SISAK**

Aŭtobuso: 10h30; 13h00; 14h30
Trajno: 7h42; 9h09; 10h43; 11h40; 13h44; 14h36

**SISAK - ZAGREB**

Aŭtobuso: 17h30; 18h15; 19h00; 20h00
Trajno: 18h23; 19h17; 20h15; 21h24



# 5-a ESPERANTO-BOATADO SUR LA RIVERO KUPA

# Karlovac - Sisak

## 31-a de julio – 5-a de aŭgusto 2013

**Organizanto:**

Esperanto-societo Sisak, Lonjska 74, HR-44000 Sisak, Kroatio
Poŝtelefonoj: 00 385 99 243 33 52;
Retadreso: boatado.kask@gmail.com

**Kunorganizantoj:**

Esperanto-societo “Viktor Mihovilić” Karlovac
Esperanto-societo “Monda paco” Velika Gorica
Esperanto-societo Petrinja

aventuro en la naturo

## KONCIZAJ INFORMOJ PRI LA BOATADO

**PROGRAMO:**

**Merkredon, la 31-an de julio** - Kolektiĝo de partoprenatoj en Karlovac, en la boatstartejo apud la ponto Banija. Transporto kaj enakvigo de boatoj kaj kontrolo de motoroj, provizado de benzino, nutraĵoj kaj trinkaĵoj, preparo de biavko, promengvidado tra Karlovac, interkonatiĝo kun la organizantoj kaj boatstiristoj, konatiĝo kun la progaramo de la boatado kaj la reguloj de la surakva vivo, filmprojekciado, kultura programo.

**Ĵaŭdon, la 1-an de aŭgusto** - Salutparoladoj de oficialaj urbaj kaj distriktaj reprezentantoj, enakvigo de botelo kun kroata kaj Esperanta tekstoj, starto kaj boatado laŭ la unua vojparto: 31 km de Karlovac ĝis Šišljavić (en du etapoj po 2 horoj), bivakado en Šišljavić.

**Vendredon, la 2-an de aŭgusto** - La dua vojparto: 32 km de Šišljavić ĝis Pokupsko (en du etapoj po 2 horoj), bivakado en Pokupsko

**Sabaton, la 3-an de aŭgusto** - La tria vojparto: 34 km de Pokupsko ĝis Letovanić (en du etapoj po 2 horoj), bivakado en Letovanić

**Dimanĉon, la 4-an de aŭgusto** - La kvara vojaprto: 16 km de Letovanić ĝis Petrinja (en du etapoj, 2 + 1 horoj), bivakado en Petrinja.

**Lundon, la 5-an de aŭgusto** - La kvina vojparto: 15 km de Petrinja ĝis Sisak (en unu etapo, 1,5 horoj), solenaĵo en Sisak okaze de la Tago de patrolanda danko kaj Tago de kroataj defendantoj.

**Ĉiutagaj programoj:** matena gimnastiko, Esperanto-kurso kun ekzameno la lastan tagon, naĝado en la rivero, prelegoj, kulturaj programoj.

**ALIAJ DETALOJ:**

**Transporto:** per lignaj kaj metalaj motorboatoj
**Loĝado:** en bivakoj en propraj tendoj kaj dormosakoj
**Manĝoj:** matenmanĝo je la 8h00-9h00; tagmanĝo je la 13h00-14h00, vespermanĝo je la 19h00-20h00.
**Kotizo:** por plenkreskuloj - 400,00 kunaoj; por infanoj ĝis 12-jaraj - 200,00 kunaoj; unutaga partopreno - 100,00 kunaoj. La kotizo inkluzivas la kostojn de benzino, manĝoj ekde la vespermanĝo la 31-an de julio ĝis la vespermanĝo la 5-an de augusto, ĉiujn programojn kaj asekuron de la partoprenantoj. La garantian sumon de 100,00 kunaoj po partoprenanto oni pagu ĝis la 25-a de junio 2013 al la ĝirkonto de Esperanto-societo Sisak n-ro HR1024840081104788944, kaj la reston al la sama konto ĝis la 26-a de julio aŭ en Karlovac la 31-an de julio post la kolektiĝo de partoprenantoj. Eksterlandanoj sendu sian aliĝilon al la organizanto, post kio oni ricevos informon pri pagmaniero.

## 5-a ESPERANTO-BOATADO SUR LA RIVERO KUPA
### Karlovac - Sisak, 31-a de julio - 5-a de aŭgusto 2013

# A L I Ĝ I L O

Nomo kaj familia nomo: ______________________

Dato, loko kaj ŝtato de naskiĝo: ______________________

Loĝadreso: ______________________

______________________

Telefonnumero(j): ______________________

Retadreso: ______________________

Membro de Esperanto-societo: ______________________

| | | |
|---|---|---|
| Mi deziras partopreni matenan gimnastikon | JES | NE |
| Mi deziras partopreni Esperanto-kurson | JES | NE |
| Mi deziras lerni boatstiradon | JES | NE |
| Mi deziras lerni fiŝoki | JES | NE |
| Mi deziras lerni topografion kaj orieniĝon en la naturo | JES | NE |

Mi konfirmas, ke mi komprenis la bazajn informojn pri la aranĝo, kaj mi akceptas la kondiĉojn.

Subskribo:

______________________

La aliĝilon bonvolu sendi al:

Esperanto-societo Sisak, Lonjska 74, HR-44000 Sisak, Kroatio
boatado.kask@gmail.com